Laboro sur la propaganda kampo estis pli vigla ol en la tuj antaŭaj jaroj. Tio rezultis ne nur de la organizita klopodo de la Asocio, sed ankaŭ de privataj penoj de nombro da bone konataj entuziasmuloj. Antaŭ 1939 oni uzis la radion por propagando en Aŭstralio, kaj estas plaĉe al ni raporti, ke tiele samideanoj denove aŭdigas paroladojn pri Esperanto en la Aŭstralian eteron. Aparte rimarkinda estas la laboro de S-ro A. Turner (Shepparton, Viktorio) kiu komencis horeton de novaĵo pere de Esperanto ĉe Radiostacio 3SR. D-ro Caldera ankaŭ kontribuis, aranĝante disaŭdigojn de kelkaj samideanoj en Perth, kaj paroladoj de S-ino Hanks (Melbourne) aŭdigis ĉe la nacia programo en ĉiu ŝtato. Sydney Esperanto-Societo aranĝis paroladojn en la "Domain" (parko kie oni rajtas tutlibere konsili aŭ kritiki ion ajn). Tiuj allogis multan atenton pro tio, ke unu membro parolis Esperante kaj dua tradukis Anglen por aŭskultantoj. S-ino Langtree en Mez-Kvinslando lerte klopodis inter kamparaninoj kun bonaj rezultoj. S-ro Wanmer (Brisbane) gvidas la propagandon por la Asocio kaj protokolas la diversajn penojn.

Trapasis ankoraŭ unu plia sukcesoplena jaro por nia oficiala organo *La Rondo*. Ĝi aperis ĉiun monaton sen eĉ unu rompo, malgraŭ la apartaj malfacilaĵoj de la milita tempo. La eldonnombro ne malpliigis, kaj fiere ni sendas modestan iomon da ekzempleroj al Ĉinujo, Islando, Meksikio, Hispanujo, Svisujo, Argentino, Usono, Sud-Afriko, Nov-Zelando, kaj Anglujo. Ĝis nun ni ne povis pretigi sufiĉe da ekzempleroj por transmara vendo, sed la redakcio esperas fari tion kiam pacaj tagoj permesos presadon anstataŭ la nuna multobligado. La samideanoj en Aŭstralio multon ŝuldas al la senlaca laboro de la redakcio, kiu konsistas el S-ro F. R. Banham (Melbourne), F-inoj L. E. Bailey kaj W. Addis (ambaŭ Adelaide).

Dum la jaro, sub gvido de S-ro P. E. Schwerin (Sydney), ni okazigis tradukan konkurson. Ĝi estis konkurso inter kluboj, kiuj faris komunan penon. Premioj estas aljuĝitaj

al Sydney Esperanto-Societo kaj Melbourne Esperanto-Klubo.

Pro la bonvolo de la Brita Esperanto-Asocio ni povis starigi korespondan kurson por novaj lernantoj. S-ro F. Pitt (Melbourne) estras la projekton kaj helpas lin instruistoj en ĉiuj ŝtatoj. Estas tro frue juĝi ĝian sukceson, ĉar ĝi komencis nur en la lastaj monatoj de la jaro, sed ni antaŭvidas simile plaĉan rezulton al tiu ĝuita en Anglujo.

La libroservo daŭre havigis al lokaj samideanoj la librojn necesajn al sukcesa laborjaro. La profito de la entrepreno helpis pligrandigi la modestan kapitalon, tiel ebligante eĉ pli grandan provizaĵon en 1945. La sekretario havis bonajn subtenantojn en la personoj de F-ino E. B. Carrick (Brisbane), S-ro F. Pitt (Melbourne) kaj S-ro A. Chamberlin (Perth).

Ankoraŭ restas multo farenda por certigi al ni sufiĉe da altnivelaj instruistoj, sed oni rajtas esperi, ke la populareco de ekzamenoj montras tiucelan progreson. Felice en ĉiu klubo estas kelkaj malnovaj, fidelaj kaj altgradaj gvidantoj por la kursanoj. Pastro C. C. Cowling (Tasmanio) regas la ekzamenojn, kaj la asocio akceptas, uzas kaj rekomendas kiel normon la ekzamenan sistemon de la Brita Asocio.

Niaj kluboj bonvenigis al siaj kunvenoj vizitantojn el diversaj transmaraj landoj. Ĉi tiu estas plezuro, kiu, ni esperas, daŭros post la milito, kiam pli feliĉaj tagoj permesos pli imponan, eĉ se ne pli elkoran, regalon.

La Jarlibro, por uzo de niaj membroj, denove aperis. Ĉi tiu grave rolas en nia organizado, pro tio ke super ĉiuj fakoj prezidas komisiitoj loĝantaj en vaste disaj urboj sur nia kontinento. Ni ne havas centran oficejon, kun rezulto ke membroj devas sin turni al malsama loko por ĉiu servo de la Asocio. En la Jarlibro aperis la informon pri niaj aferoj, kio ebligas ĉi tiun sistemon funkcii glate. Ĉi ankaŭ enhavis nomadreson de ĉiu membro kaj abonanto de nia oficiala organo.

En 1944 Aŭstralio atingis la pli grandan membro-ciferon en I.E.L. iam atingita de ĉi tiu lando. Ni esperoplene antaŭvidas eĉ pli grandan ciferon por 1945.

Kvankam la Asocia Komitato faris longedaŭran planon de laboro, ĝis nun ĝi ne fiksas programon por venontaj pacojaroj. En la Pacifika regiono niaj registaroj ne povas antaŭvidi fruan finiĝon de milito, kaj ni scias, ke la batalo devos pli furiozi antaŭ ol ni povas atendi pli feliĉajn tagojn.

Tamen, la Komitato estas preta gvidi tutlandan penon tuj kiam cirkonstancoj permesos.

Ni sendas saluton al niaj frataj Landaĵ Asocioj de I.E.L. kaj bondeziron al ĉiu Asocio, grupo, kaj samideano en transmaraj landoj, esperante ke 1945 alportos la pacon por kiu ni ĉiuj sopiras.

G. HILLERMAN

## BRITUJO

Dum 1944 ne okazis ia aparte grava afero rilate la movadon en Britujo, sed daŭra progreso evidentiĝis, kaj la jaro estis bona por la Brita Esperantista Asocio. Kelkaj centoj da novaj aliĝoj registriĝis (multe pli ol la "forvelkoj") grandparte en la kategorio de Individua Membreco de I.E.L. : la tuta sumo enkasigita kiel membro-kotizoj estis £1,378, el kio £831 eniris la kason de B.E.A. kaj £547 tiun de I.E.L.

Librovendado ĉe B.E.A. dum la jaro, superis tiun de 1943, kaj alportis profiton de pli ol £600—multe pli ol en 1941 kaj 1942, kaj ol en la jaroj tuj antaŭ la milito. Korespondaj kursoj estis pli postulataj ol iam antaŭe, kaj 1459 lernantoj aliĝis la elementan kurson, kontraŭ 1248 en 1943.

La Jarkunveno de B.E.A., okazinta en Birmingham, estis tre sukcesa; kiel en 1943, la ĉeestantaro estis pli nombra ol eĉ en multaj antaŭmilitaj jaroj, malgraŭ malabundo (pro militaj malfacilaĵoj) de kutimaj kongresaj distraĵoj. Pluraj alilandaj samideanoj ĉeestis, kaj salute alparolis la membrojn, je ĉies plezuro kaj kontento.

Multaj lokaj grupoj kaj Federacioj regule kunvenadis kaj konferencis dum la jaro. Estis notinde, ke la Londona Klubo (nun funkciinta dum pli ol 40 jaroj) daŭre kaj sukcese kunvenis, eĉ dum kelkaj monatoj kiam okazis severaj aeratakoj sur la ĉefurbon. Multaj alilandaj amikoj regule aŭ okaze vizitis tiun klubon kaj aliajn grupojn en Britujo, kaj ilia ĉeesto estis reciproke kuraĝiga. De kelkaj vidpunktoj militaj cirkonstancoj povas alporti avantaĝojn!

La Eduka Sekretario de B.E.A. (S-ro M. C. Butler) faris, laŭkutime, vizitojn al lernejoj kaj kolegioj en diversaj regionoj kaj denove propagandis al multaj miloj da lernantoj kaj iliaj instruistoj. Ĉe tiaj vizitoj vendiĝis pluraj miloj da lernolibretoj, kiuj certe portis ian scion pri la lingvo en grandan nombron da hejmoj; eĉ kiam

kurso ne starigis en la lernejo mem—afero, pro diversaj kialoj, ne ofte aranĝebla ĝis nun.

La nacia gazeto *The British Esperantist* regule aperis; ankaŭ eldoniĝis federaciaj bultenoj kaj gazetoj, kaj la organo de la Brita sekcio de T. J. O.—kiu sekcio mem varbis multe da ĝejnuloj dum la jaro kaj estas en floranta stato. La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj ankaŭ daŭrigis tre aktive sian laboron kaj interalie okazigis tre sukcesan “Someran Lernejon” en alloga kampara loko.

Por la postmilitaj jaroj en Britujo oni nun antaŭvidas ĉefe la disvastigon kaj intensivigon de la nunaj fakoj de la laboro—propaganda kaj eduka—inkluzive (ĉe B. E. A. mem) de daŭra reklamado de la korespondaj kursoj, kiuj montriĝis tiel sukcesaj por la movado kaj tiel bone funkciis kiel varbiloj de novaj aktivaj membroj de la Asocio. Jam multaj el tiaj kursanoj mem instruas kursanojn, fondis grupojn aŭ fariĝis Delegitoj de I. E. L.

Plene evidentiĝis, ke en Britujo tute fiaskis la klopodoj disvastigi *Basic English* kaj aliajn fuŝajn projektojn por solvi la lingvan problemon. Neniu atentis tiajn, krom kiel temoj por ŝercado aŭ okaza diskutado, kaj neniu societoj starigis por ilia propagando aŭ instruado.

La Brita Esperantistaro ĝojas pro la jam komenciĝinta restarigo de rilatoj kun la samideanoj en landoj suferintaj fremdan okupadon, kaj subpremon, kaj en fido kaj espero antaŭvidas, por dato ne tro malproksima, plenan kunlaboradon kun tiuj kuraĝaj kaj konstantaj amikoj.

B. E. LONG

## EGIPTUJO

En la lasta jaro la movado en Egiptujo pli enradikiĝis. En Kairo la Peranto de I. E. L., S-ro Megalli, gvidis kursojn ĉe la Nacia Junulina Kristana Asocio NYWCA kaj ĉe la Oksford Instituto. De tempo al tempo ni publikigas en la loka gazetaro (Araba, Franca kaj Angla) raportojn kaj informojn pri Esperanto. Ankaŭ ni nun gvidas kursojn per korespondado, *Popular Course*, en Angla kaj Franca lingvoj, kaj ni esperas eldoni tiun kurson ankaŭ en Araba post nelonge.

En Aleksandrio tre vigle laboras por nia afero S-ro Ross Robbins, Nov-Zelanda Esperantisto, kiu nun troviĝas en Egiptujo. Li gvidis kursojn ĉe la militista klubo *Montgomery House*. Li ankaŭ sukcesis revigligi kaj kolekti la malnovajn gesamideanojn kaj puŝi ilin al

la laboro. Li kontaktis S-ron E. Lunzer kaj F-inon Sofio Papassiniou kaj kune ili laboras por la movado. Lastatempe S-ro Benzaken gvidis kurson ĉe la loka YMCA. En Suez laboras nun nia malnova samideano S-ro Iskandar Hanna, oficisto ĉe la doganejo, helpata de nia Angla samideano, S-ro Wilkinson, kaj li gvidis kurson ĉe la Egipta klubo. En Port Said laboras nia samideano S-ro Harfuŝ, kaj en Fayum S-ro N. Mahrus.

La plej elstara afero de la jaro estas la aranĝo de la Unua Egipta Esperanta kongreso, kiu okazis en Kairo je la 15-a kaj la 16-a de Decembro: ĝin ĉeestis Esperantistoj el tri diversaj urboj kaj reprezentantoj el sep diversaj landoj. Tiu donis al la kunveno internacian karakteron.

Landa Asocio, Egipta Esperanto-Asocio, estas nun organizita kaj ni esperas baldaŭ kontakti ĉiujn individuajn samideanojn tra la lando. Do, malgraŭ la milito nia afero vivas en la lando de la faraonoj.

T. MEGALLI

## FIGIO

Dum la jaro 1944 D-ro Fred J. Williams, la delegito en Suva, propagandis en diversaj lokoj en Figio. Li faris paroladojn pri Esperanto ĉe Suva, Laŭtoka, Naoi, kaj Sigatoka sur la insulo Viti Levu. Simile li parolis ĉe Levuka en Ovalau kaj ĉe Labasa en Vanua Levu.

S-ro F. H. Miles, antaŭe en Nov-Zelando, gvidas kurson ĉe Suva, kaj S-ro C. G. O. Parr gvidas kurson ĉe Levuka.

Ankaŭ funkcias grupeto ĉe Vatukoula en la norda parto de Viti Levu. Kelkaj izoluloj studas la lingvon private. En Figio ekzistas kreskanta intereso pri la internacia lingva problemo.

F. J. WILLIAMS

## FINNLANDO

Ni ricevis informon, ke dum la lastaj jaroj multoblighita gazeto *La Nova Tago* estas eldonita kaj ĉirkaŭiris grupojn kaj izolajn samideanojn. Oni ankaŭ eldonis novan presitan gazeton *Esperanto-airut* (*Esperanto-Heroldo*) komence de 1945.

Estas aranĝata komuna tendaro kaj Esperanta kurso en Punkaharju la 8-14 Julio; espereble ankaŭ ĉeestos Svedaj Esperantistoj.

RED.

## FRANCUJO

*La jena raporto jam aperis en "Esperanto Internacia", sed ĉar ĝi certe interesos multajn membrojn, kiuj ne vidas la gazeton, ni represas ĝin ĉi tie.*—RED.

31a de Julio 1940a. Mi trapasas Noyant, kie loĝis ekde la milito Jean Guillaume. Kompreneble, ni parolas pri kaj en Esperanto. Kion fari? Ĉu sekvi la prudentajn kaj eĉ pesimistajn konsilojn, kiujn donas al ni kelkaj el la gvidantoj de S.F.P.E.,\* kaj fermi la Esperanto-Centron, 34 rue de Chabrol, Paris, ĝis la fino de la milito? Ĉu, spite ĉion, spite la malpermeson kunveni, organizi kursojn, sendi cirkulerojn, aperigi gazetonj, tamen provi konservadon de la flamo kaj eĉ prepari la estontecon? Multaj el niaj grupoj en la okupita regiono preferas la unuan solvon. Jean Guillaume kaj mi decidis sekvi la duan, kaj ni prenis la riskon.

Multaj el niaj ĉefaj kunlaborantoj estas en Germanujo. Ili eĉ organizis Esperanto-kursojn en la koncentrejoj. Ni ne povas doni ĉi tie ties nomojn, pro eventuala venĝo de la Germanoj. La Prezidanto de I.E.L., Generalo Bastien, estas for de Paris. Mi interkonsentas kun Jean Guillaume kaj decidis la jenon por reorganizi la Esperanto-kunvenojn unue en Paris. La 12-an de Septembro okazas la unua dumokupada vespermanĝo de la Esperantistoj en Paris. Ni estas 14. Kaj ĉiu dek-dua de ĉiu monato, ĝis Aŭgusto 1944, ni tiel kunvenas, atingante eĉ la nombron de 40 kunmanĝantoj. Interkonsente kun F-ino Huguette Royer, la Komitato por la helpo al la Esperantistaj soldatoj fariĝas Komitato por helpo al la militkaptitoj, pere de Esperanto. Kaj nia Centro, 34 rue de Chabrol, estas malfermita merkrede vespere kaj sabate posttagmeze, por—almenaŭ oficiale—doni informojn al la familianoj de niaj militkaptitoj kaj sendi pakaĵojn al ili, kaj ankaŭ pruntedoni librojn de la Biblioteko. Fakte, estas kunvenoj, kie ni parolas Esperante, kaj nia granda plezuro estas alporti la lastajn rakontetojn mokantajn pri Germanoj; ankaŭ, ni kune aŭskultas la Britan radion. Kelkafoje, ni estas nur kvar aŭ kvin; kelkafoje ni estas pli ol dudek. Dufoje, en 1940 kaj en 1942, Germanoj eniras nian Centron dum niaj kunvenoj. Mi ricevas ilin tute simple, dirante: "Ni akceptas vin ĉi tie, ne kiel Germanojn, sed kiel Esperantistojn." Ili ne postulas

plian informon. Ĉeĥo laboranta por Todt-organizo ankaŭ vizitas nin.

En Oktobro 1940, nia konsilantaro, por la unua fojo, kunvenas en la kaŝiteco ĉe S-ro Couteaux. Ĉeestas S-roj Archdeacon, Belhoste, Cozic, Guillaume, Couteaux, F-ino H. Royer, S-roj Bobin, Capdebosq, Hammond kaj mi. Samtempe, du kursoj malfermiĝas en Paris, en nia Centro, sub gvidado de S-roj Capdebosq kaj Bobin. Kurso ankaŭ funkcias en Le Mans, sub gvidado de S-ro Véron.

Ni ekscias, ke la Germanoj forpelas la Esperantomovadon kaj ŝtelas la kasojn de la Esperantistaj organizaĵoj en la okupitaj landoj. Ni do alprenas decidon. Oficiale, la 50,000 Fr. kiujn, iam, nia Prezidanto Archdeacon donacis al S.F.P.E., estas konsiderataj kiel nura prunto. Kun tiu mono, ni aĉetas, je la nomo de Jean Guillaume, akciojn. La ceteron de la monhavo de S.F.P.E. ni oficiale donacas por helpo al la militkaptitoj. Restas do, je la fino de 1940, preskaŭ nenio al ni.

Kaj la jaroj foriras. Ni konservas ĉion, kio estas konservbla. En kelkaj urboj, kiel Lorient, kursoj povas okazi kun la permeso de la Germanoj. En aliaj, kiel Besançon, la petitaj permesoj estas malakceptitaj. Cetere, preskaŭ ĉie, kursoj okazas, sed kaŝe.

En Paris, nia honora Prezidanto, Rollet de l'Isle, per cirkuleroj, provas propagandi Esperanton, almenaŭ kiel "Eŭropan lingvon". La "Gestapo" vokas lin al sia Centra Oficejo. Rollet de l'Isle respondas, ke generala ofico de la Franca ŝiparo ne kutimas respondi al kunvokoj, sed ke li plezure akceptos la agentojn de "Gestapo", se ili deziras viziti lin. Tri superaj oficoj de "Gestapo" sin prezentas ĉe li, kaj dum tri horoj petas de li informojn pri lia por-Esperanta agado. Fine, ili foriras, dirante nur al li, ke li ne faru tro da bruo por Esperanto.

En Julio 1941, la ŝtatestro de Vichy malpermesas al ĉiuj ŝtaticistoj okupiĝi pri io alia krom la ofico. Do, S-roj Couteaux kaj Belhoste devas rezigni siajn postenojn, kiel ĝenerala sekretario kaj kasisto de S.F.P.E.—Jean Guillaume kaj mi anstataŭas ilin, kaj, kun Prezidanto Archdeacon, prenas, ekde tiu momento, la planan respondecon pri la agado de S.F.P.E.

Samtempe la Esperantista Centra Librejo transloĝiĝas kaj malfermas malgrandan butikon en la latina kvartalo, Rue Descartes.

En 1942, tri libroj aperas en la okupita Francujo pri aŭ pro Esperanto. Estas la dua eldono de la instrua

\* Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

libro de Delaire : *Esperanto en 12 lecionoj* : la katalogo de Esperantista biblioteko de Saint Omer de Deligny, kaj libro pri Japanujo, tradukita el Esperanto, de Hammond.

En la ne-okupita Francujo, la movado bone funkcias ĉefe en Lyon, Marseille kaj Toulouse. Lyon eldonas bultenon *Comprendre* kaj Toulouse *Tuluza Stelo*.

Kelkajn monatojn antaŭ la liberigo, la Grupo de Lille eldonas kaŝitan bultenon *Inter ni*. Yelland, el Aspremont, arestita kaj enkarcerigita en la koncentrejo de Saint-Denis kun Britaj kaj Amerikanaj civil-personoj, malfermas Esperanto-kurson kaj eldonas 12 numerojn de *Esperantoga-eto*, kies ekzempleron li donas al la Pariza Esperantisto, kiu ĉiudusemajne vizitas lin, alportante al li la amikan senton de nia granda familo.

René Lech, militkaptito, liberigas kaj rekomencas vigan propagandon en Perpignan. F-ino Colléatte en Amiens, F-ino Gallet kaj Volqueman en Lille, Levin en Lyon, Laffon en Toulouse, George kaj Houzelot en Besançon, Paquereau en Vannes, Saget en Elbeuf, Le Seac'h en Quimper, Delaire en Orléans, kaj multaj aliaj, neniam malesperas, daŭre propagandas, kunvenas, malfermas kursojn.

Sed, bedaŭrinde, ankaŭ la morto forprenas niajn plej bonajn samideanojn. Tri estas mortpafitaj de la Germanoj pro ilia porpatruja agado : Albert Germaine, Kolmer, Serge Clergeot. Du, pro la invado de Francujo, sin memmortigas, S-ino Magnus el Orléans, kaj F-ino Tondelier (F-ino André) la juna Esperantista parolintino de Lille-P.T.T. Multaj aliaj ni devas ankaŭ bedaŭre adiaŭi dum la okupado : André Baudet, Maurice Rollet de l'Isle, Paul Échard, D-ro Foveau de Courmelles, Capatana, René de Lajarte, Charles Verax, Gabert, Perrin, Soubranne, Bourniche, Bouvier, Angeli, Camescasse, Marty, Pastro Gardette, Dauteuil, F-ino Larroche, S-ino Fallot, F-ino Biquelle, S-roj Baire, Sergeant, F-ino Pannevin, S-roj Vermin, Puigrenier, René Beck, Dieulot, Fichot, Desray, S-inoj Th. Cart, Marquet kaj Jacob, ktp., ktp. . . .

De tempo al tempo alvenas al ni novaĵoj. Kelkaj estas malbonaj : letero el Nederlando informas nin pri la morto de L.E.E.N.,\* vojaĝo de Jean Guillaume al Bruselo permesas al ni ekscii pri detruo de la Esperanta vivo en Antverpeno. Aliaj estas bonaj. En Julio 1941, pere de

\* L.E.E.N. = La Estonto estas Nia, la Nederlanda landa organizaĵo.

S-ro Mathias, loĝanta en Maroko, ni ricevas la unuan informon pri I.E.L., nia Centro en Londono, kaj la propaganda centro en Stockholmo. Poste, de tempo al tempo, privata poŝtkarto de S-ro Malmgren alportas al ni iom da aero el la liberaj popoloj.

Kaj ĉiam, esperante, ni atendas . . . 1942-1943. Ni ekscias, ke baldaŭ venos la tago de la liberigo. Ni devas esti pretaj. Jam cirkuleroj foriras al niaj grupoj.

En Junio 1943, ni decidis malfermi enketon pri "Esperanto post la milito", laŭ iniciato de S-ro Jean Couteaux. Respondas al la enketo S-roj Bastien, Couteaux, Archdeacon, Belhoste, Rousseau, Guillaume, Petit. La rezultoj estas tiel bonaj, ke la Komitato decidis organizi konkurson pri la temo : "Kiaj estas, laŭ vi, la kialoj de la nesufiĉaj sukcesoj de Esperanto antaŭ la milito : (1e) nacie ; (2e) internacie ? Kiajn rimedojn oni devus uzi, post la milito por rapide finsukcesi ?" En Septembro 1943, ni dissendas 350 cirkulerojn pri la konkurso tra la tuta lando. 70 samideanoj partoprenas la konkurson. S-ro Chailloux, instruisto en Onlay (Nièvre) ricevas la unuan premion. Dek unu aliaj konkursoj ricevas ankaŭ premiojn. Ĉiuj partoprenintoj de la konkurso ricevas *Raportoj kaj konkludoj de la Konferenco de 1937*.

Laŭ la respondoj de la Konkurso, la Komitato de S.F.P.E. alprenas la 18 punktojn pri la unuigo de la Francaj Esperantistoj. Jen tiuj 18 punktoj :

### Nacia Organizado

(1) La Francaj propagandaj Esperanto-asocioj devas unuigi en unu-nura asocio.

(2) La unuigita Franca societo devas interkonsenti kun la fakaj Esperanto-organizaĵoj por aranĝi la propagandajn manifestaciojn de ĉiuj Esperanto-asocioj de Francujo.

(3) Interne de la novaj Esperanto-asocioj, la gvidantoj devas esti, principe, novaj homoj.

### Disciplino

(4) Ĉiu alprenita decido de la oficialaj organizaĵoj, valoras por ĉiuj, eĉ se ĝi malplaĉas al kelkaj.

(5) Ĉiu devas, discipline, klinigi antaŭ la opa spirito.

(6) Oni devas ĉefe varbi novajn anojn, serĉante pli la kvaliton ol la kvanton.

(7) La propaganda movado devas esti nepre neŭtrala kaj oni ne devas miksi ian ideologion kun ĝi.

(8) La gvidantoj de la propagandaj organizaĵoj devas ne esti samtempe gvidantoj de politikaj organizaĵoj.



## Propagando

(9) Ĉiu sukcesa rimedo por la propagando estas inda.

(10) La necesaj rimedoj por pli granda propagando devas esti kolektitaj per monoferoj.

(11) En Francujo devas esti nur unu propaganda gazeto, kiun ĉiuj devas aboni.

(12) La propagandaj kaj instruaj libroj devas esti eldonitaj per la monrimedoj de la nacia asocio (monhavo de la asocio kaj pruntoj).

(13) La komercaj organizaĵoj (hoteloj, instrudomoj, k.t.p.) devas esti starigotaj ekster la nacia asocio.

## Instruado

(14) Unu-nura Instituto devas zorgi pri la instruado kaj la ekzamenoj.

(15) La Esperanto-profesoroj devas ricevi salajrojn de la asocioj, kiuj dungis ilin, aŭ de siaj lernantoj.

(16) Neniu instru-libro devas esti rekomendata de la nacia asocio sen la antaŭa aprobo de la Instituto.

## Internacia Organizaĵo

(17) Nur devas ekzisti unu internacia asocio por la propagando kaj la praktikaj servoj.

(18) La sidejo de la internacia asocio devas esti en libera lando kun favora monŝanĝo.

La 18 punktoj estas senditaj denove al 500 adresoj de grupoj, samideanoj, k.t.p., en Februaro 1944.

Nun, ni estas pretaj. Ni daŭrigas traktadojn kun la grupoj de Lyon kaj Toulouse, kiuj estis ĝis nun ekster S.F.P.E. . . . Kaj Junio 1944 alvenas. Nia espero efektiviĝas . . .

Multaj estas la samideanoj en niaj vicoj, kiuj partoprenas, kiel "F.F.I." la batalon por la liberiĝo de Francujo. En Marseille, Claude Vernay, rifuĝinto el Dunkerque, konsilanto de S.F.P.E., estas vundita kaj sin trovas ankoraŭ en malsanulejo je la komenco de Oktobro.

Aliaj estas transportitaj en Germanujon; inter tiuj estas fame konataj Esperantistoj de Paris kaj Marseille, kies nomojn mi ne povas nun skribi pro kialoj facile kompreneblaj.

Dum la "okupado", F-ino Paulier, kaj poste F-ino Cécile Royer multe helpis min por la kunvenoj kaj la korespondado. Nuntempe, pro grava profesia laboro, mi estas devigata forlasi mian postenon je la gvidado de S.F.P.E. Samtempe, pro sia aĝo, nia Prezidanto Arch-

deacon rezignas la Prezidantecon. Estas Jean Couteaux, kiu fariĝas la nova Prezidanto de S.F.P.E., kaj Jean Guillaume, ĝis nun ĉef-delegito de I.E.L., la nova ĝenerala sekretario.

Nia asocio estas en bonaj manoj. Ni scias, kien ni volas iri, tute same kiel nia Francestro, Generalo de Gaulle, scias, kien li gvidas nian landon.

Ni tiel kuraĝe laboris en la sekreteco, ĉar ni neniam malesperis, nek pri nia Francujo, nek pri nia Esperanta idealo. Tion, kion ni suferis per la spirito, sub la Germana premado, neniuj povas imagi. Tio estas nun nur malbona sonĝo; sed, miaj legantoj devos kompreni, ke, dum ankoraŭ pluraj jaroj, ni ne povos esti same, kiel ni estis antaŭ la milito.

Ni tamen denove esperu. Ni deziras, spite ĉion, akcepti en nia liberigita lando, la unuan postmilitan universalan kongreson. Je tiu momento, vi kaj ni, fine finscios, ĉu, jes aŭ ne, ni ne tro malbone servis Esperanton, dum la plej malhelaj tagoj, kiujn travivis Francujo, el ĝia jarcenta historio.

PIERRE PETIT, *Francujo*

*Decembro 1944*

## ISLANDO

Inter la jaroj 1939 kaj 1944 la Esperanto-movado en Islando ne estis vigla, eble parte pro la terura milito furiozanta en la ĉirkaŭa mondo. Kvankam la milito neniam atingis nian landon, ĝi faris gravan ŝanĝon al la vivmaniero de la Islanda popolo; pro ĝi la popolo fariĝis multe pli okupata ol antaŭe. Pro tiu kaŭzo la funkciado de societoj estis pli malfacila dum la milito ol antaŭe, kaj eble tio estas la ĉefa kaŭzo de la malvigleco de la Islanda Esperanta movado dum la milito.

Sed estas ĝojige raportiti, ke en la jaro 1944 la situacio ŝanĝiĝis. En januaro estis starigata korespondanta Esperanto-kurso, en kiu partoprenis 260 personojn (ili tamen ne ankoraŭ ĉiuj finis ĝin). En aprilo estis fondata Esperantista societo en Reykjavík, kiu havas nun 56 membrojn kaj okazigas regule kunvenojn. Ĝi ankaŭ okazigis ekskurson en la pasinta somero. La nomo de tiu societo estas La Esperantista Societo "Aŭroro" en Reykjavík, kaj ni Aŭroranoj iom fieras pro tio, ke nia societo estis fondata en la sama jaro en kiu reestabliĝis la Islanda Respubliko; mi diris reestabliĝis, ĉar inter la jaroj 930 kaj 1262 estis respubliko en Islando.



Nia societo starigis daŭrigan Esperanto-kurson (tiu ne estas koresponda kurso) inter tiuj el siaj membroj, kiuj deziras kaj havas okazon partopreni en ĝi. Bedaŭrinde la partoprenantoj ne estas multaj, nur ok.

Mi ne povas diri multon pri la estonto. Nia movado Islanda estas malforta. Mankas ekzemple al ni gazeto aŭ bulteno. Sed nia plej grava malfacilaĵo estas manko de Islanda-Esperanta Vortaro. Miaopinie, oni povas atendi veran progreson de nia Islanda movado, nur kiam tia vortaro estos havebla. Jen la plej urgaj taskoj por ni Islandaj Esperantistoj: eldoni aŭ eldonigi Islandan-Esperantan vortaron, kaj gazeton aŭ bultenon, kiu povos servi kiel organo de nia movado en Islando. Sed kiam ni estos sufiĉe fortaj finance kaj alirilate por tion efektiviĝi, tion mi ne scias.

Ó. S. MAGNÚSSON

## ITALUJO

Agado jam rekomencis en Italujo, sed nur mallonga raporto estas nuntempe ebla. S-ro Minnaia, en Romo, pere de anonco en semajna gazeto, petis adresojn de Esperantistoj. Post esploro, li eltrovis ke la direktoro mem volas revivigi la movadon, kaj tiu disponigis al li kelkajn kolonojn en ĉiu numero de la gazeto. Du kursoj komenciĝis, kaj enskribiĝis pli ol 20 personoj, inkluzive de la sekretario de la direktoro.

Ges-roj Minnaia pretigis mallongan gramatikon kaj vortaretojn, kaj tiujn eldonis proprariske la gazeto! En teknika revuo oni aperigas Esperanto-kurson.

F. D. MURPHY

## KANADO

El Vancouver ree ni salutas, forte, esperante, ĉar la pasinta jaro donis al ni kelkajn sukcesojn, kaj la estonta vojo pli klare elmontriĝas.

En Aŭgusto, post iom da incitado, la Lerneja Direktoro subite anoncis al la Delegito ke ili eldonis la prospektojn por 1944-5, kaj inter la studemtoj ili metis Esperanton. Pro la mallonga tempo, kaj la alta prezo, ni ne sukcesis starigi kurson en 1944, sed ni intencas tenadi nian lokon, kaj esti preta por post-milita funkciado pro ĉi tiu komenco.

Dum la jaro oni inaŭguris oficialan adoptadon de la Rusa urbo Odessa. La loka fako de la Nacia Konsilantaro por Kanada-Soveta Amikeco organizis "Odessa-semajnon"

en Aŭgusto. Ni ekkaptis la okazon por sciigi al la Konsilantaro ke ekzistas en Odessa multe da Esperantistoj, kaj oni permesis ke ni sendu, pere de la U.S.S.R. ambasadoro, Esperantajn salutojn kaj tradukojn al la samideanaro en Odessa. Ĉi tiun aferon, ankaŭ, ni nepre daŭrigos laŭ la eblecoj.

Je la 15a Decembro ni kune festis Zamenhofan Tagon, kiam ĉeestis kelkaj gravaj gastoj. Bonaj raportoj aperis en la gazetoj, kaj ni ankoraŭ prizorgas la faritajn kontaktojn. Ni kunvenas ĉiumerkrede ĉe Vancouver Business School, kaj esperas pli vigle agadi en la venonta jaro.

En Montreal S-ro Karlson vigle propagandas la movadon, kaj ankaŭ en aliaj urboj Kanadaj iom da revigliĝo evidentiĝas.

D. SAVILLE

## MAROKO

Post multaj antaŭpreparaj kunvenoj de pluraj ge-Esperantistoj, dank' al la iniciativo de S-ino Fink, oni kunvokis pere de la Maroka gazetaro, la konstitucian ĝeneralan kunvenon en Casablanca, kiu grupigis multajn Esperantistojn loĝantajn en Maroko, la 12-an de Aŭgusto 1944. Ĉeestis preskaŭ 90 Esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto.

Dum tiu kunveno oni decidis fondi landan asocion. Oni tralegis kaj akceptis unuanime la statutojn. La plimultaj ĉeestantoj aliĝis tuj al la fondita landa organizaĵo, kaj multaj el ili estiĝis ankaŭ individuaj membroj de I.E.L. La nova organizaĵo ricevis nomon "Maroka Esperanto-Asocio". Laŭ la decido de ĉiuj ĉeestantoj oni fiksas en Casablanca la sidejon de la Asocio, ĉar Casablanca, kiu havas 600,000 enloĝantojn, estas la plej granda urbo de Maroko. La Estraro, kiun oni elektis dum tiu kunveno, konsistas el naŭ personoj:

*Prezidanto* : S-ino I. Fink.

*Vic-prezidanto* : Ing. E. Braucourt.

*Gen.-Sekretario* : Prof. Pinty.

*Admn.-Sekretario* : S-ro Hallego.

*2 help-Sekretarioj* : S-roj Vivicés kaj Ortega.

*Gen.-Kasisto* : F-ino Chauveau.

*Help-Kasisto* : F-ino Leal.

*Bibliotekisto-arĥivisto* : S-ro Acien-Atencia.

Krome la prezidanto de ĉiu loka grupo apartenos al la konsilantaro. Adreso de la Asocio : (Kunvenejo, kursoj kaj Konstanta informejo) Parc Lyautey (à côté de l'Auberge de la Jeunesse) Casablanca. La perfektigaj kunvenoj okazas regule ĉiutagete de la 3-a horo ĝis la 6-a. La informejo funkcias ĉiutage de 4-5 horoj posttagmeze.

La Maroka Esperanto-Asocio organizis la 25-an de Novembro 1944 grandskalan publikan prelegon en konata kaj plaĉa salonego "Palais des Conférences", kiun prezidis licea direktoro S-ro André Roby. La prelegon elparolis nia ĝenerala sekretario, Prof. Pinty. La prelego havis grandan sukceson. La konferenco daŭris du horojn. La taggazetoj *Le Petit Marocain* (eldonkvanto 25,000) kaj la *Presse Marocaine*, gazetoj legataj ĉiutage en la tuta Maroko enhavis interesajn raportojn. Krome semajnaj kaj monataj gazetoj presigis interesajn artikolojn pri Esperanto. La tagaj gazetoj enpresigis dum kelkaj tagoj longajn kaj belaspertajn komunikaĵojn pri la okazonta prelego. La preparaj laboroj por efektiviĝi ĝin, daŭris dum longaj semajnoj pro la nunaj specialaj cirkonstancoj. Estas la sola tiuspeca prelego, kiu okazis dum la milito. Nia sukceso, do, estas duobla.

Jam ekzistas en kelkaj urboj lokaj sekcioj (grupoj) de nia Asocio : Fez, Marrakech, Agadir, k.t.p. Ni esperas, ke baldaŭ en aliaj urboj formiĝos novaj grupoj. Preskaŭ ĉiuj semajnaj kaj monataj gazetoj promesis aperi artikolojn pri Esperanto. Eĉ unu akceptis fari korespondan kurson, kiun gvidos S-ino Fink.

Dum la paska kongreso (1944) de la Franca instruistaro en Alger, nia ĝenerala sekretario Pinty, licea profesoro, proponis akcepti rezolucion por enkonduki Esperanton, kiel devigan temon en la lernejoj. La kongreso promesis preparoli la proponon dum la venonta kongreso (dum pasko 1945) ĉar nune ĝi ne povis ankoraŭ akcepti ĝin.

En Decembro ni starigis du novajn kursojn ; unu, vespere, kun 50 lernantoj, gvidata de Prof. Pinty, kaj dua, posttagmeze, gvidata de S-ino Fink.

La membraro ĉiam kreskas. Kiam ni atingos taŭgan nombron, konforme al la Statuto de I.E.L., nia M.E.A. aliĝos al I.E.L. Ĉiokaze ni povas mencii, ke preskaŭ ĉiuj membroj de M.E.A. estas individuaj IEL-anoj.

Estraro de M.E.A.

## NORVEGUJO

Je la fino de la jaro 1944 ni havas 509 membrojn ; la kresko do estas 40 membroj. Kvar novajn lokajn grupojn ni ankaŭ akiris dum la jaro. La vendo de lernolibroj estis pli granda ol dum pluraj antaŭaj jaroj. Vendiĝis ekzemple 710 ekz. de la lernolibro "Sistema kurso de Esperanto". La vendo okazis dank' al malgrandaj anoncoj en provincaj gazetoj. Nun ni ne kuraĝas aperi pliajn anoncojn, ĉar nia stoko de lernolibroj estas malgranda, kaj dum la milito estas preskaŭ neeble presi novajn librojn. Regas optimismo en nia rondo, kaj ni nur atendas la pacon por pliaktivigi niajn penadojn.

A. JENSSON

## NOV-ZELANDO

Kulturo verŝajne ne brile floras en periodo de internacia malharmonio ; malamo kaj idealismo ne povas ekzisti flankon ĉe flanko. Alivorte ni ne povas atendi veran progreson rilate al Esperantismo, kiam internacia buĉado pli-malpli plenigas la mensojn de la homaro, kaj la gazetaro sin okupas pri aferoj de mond-milito. Tamen estas kontentige raportoj, ke la fidela kerno de Nov-Zelandaj Esperantistoj daŭre propagandas la karan lingvon, disjetante semojn, kiam ajn okazo sin prezentas. Certe tiuj ŝancoj ne estas tiel oftaj, kiel antaŭe, sed la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio ne ripozas.

Fine de 1943 la cenzura fako de la ŝtato aldonis Esperanton al la lingvoj permesablaj dum la milito. Tio ebligis al multaj verdstelanoj en la lando denove kontakti transmarajn amikojn, kaj pruvi ke Esperanto ja estas la vivanta lingvo de vivanta popolo.

Kion ni faris en la jaro 1944 ? La Centra Komitato de la N.Z.E.A. kunvenis regule ĉiun monaton por atenti la kutimajn aferojn, kiuj levigas vole-nevole de tempo al tempo. La dikeco de la korespondo-dokumentaro por la jaro 1944 elokvente atestas, ke la oficiala movado vige daŭras malgraŭ la indiferenteco de la publiko, kaj ke la ĝenerala sekretario (F-ino Joyce Wilson) sin jetis kun entuziasmo al la interŝanĝo de leteroj. La bilanco, kiun prezentis la kasisto (S-ino Ida Cooper) montris, ke la Asocio finance bonsanas. Sekvante la kutimon de aliaj landasocioj la komitato de la N.Z.E.A. starigis Esperanto-libroservon dum la jaro.

En Februaro la prezidanto (S-ro Bertram Potts) faris paroladon pri Esperanto ĉe la Instruista Seminario. Rezulte, tuj starigis du Esperantaj klasoj, kiujn instruus S-ro Vernon J. Leck, Ĉefdelegito de I.E.L., al kiu la kunigitaj klasoj donace prezentis du librojn en Decembro, kiel signon de danko. En antaŭaj jaroj troviĝis Esperanto-klasoj en tiu seminario—sed kiam foriris la novaj geinstruistoj, tiuj klasoj kompreneble ĉesis.

La Centra Komitato decidis plioftigi la aperon de nia oficiala organo, la "Official Bulletin", kiu fondiĝis en la jaro 1929. Anstataŭ aperi dufoje ĉiun jaron, espereble la gazeto de nun aperos eble monate.

La Teatraja Komitato de la Asocio daŭre liveris al la kluboj en la lando teatraĵojn por helpi la distran flankon de klubgado. Por kuraĝigi verkantojn, tiu komitato starigis konkurson je la fino de la jaro, esperante ricevi originalajn kontribuojn kaj eltrovi samtempe talentulojn.

Dank' al la entuziasmo de la Ĉefdelegito, starigis tra la lando forta ĉeno de I.E.L. delegitoj, ĉiam pretaj servi la movadon, kiel eble plej fidele.

Malgraŭ la milito kluboj ankoraŭ floras en Auckland, Christchurch, Hutt Valley, Karori, Makarau, Masterton, Miramar, Palmerston North, Wanganui kaj Wellington.

Pro la malgrandiĝo de la ĵurnaloj, kiun necesigis la milito, raportoj pri klubaferoj malofte vidiĝis, kvankam leteroj subtenante nian aferon aperis de tempo al tempo. La ĵurnalo "North Wairapa Herald", en Pahiatua, presis ĉefartikolon pasintan Aŭguston sub la rubriko "Esperanto", kaj rekomendis la alprenon de nia lingvo.

Mallonge, ni ankoraŭ levas alte la verdan standardon, atendante tiun tagon, kiam la malsana mondo akceptos Esperanton, fine konsciante, ke jen estas taĝa kaj eminente praktika solvo de la lingva problemo.

B. POTTS

## PORTUGALUJO

Mi ne apartenas al la nombro de tiuj, kiuj kredas sinceraj promesojn de politikuloj, tamen mi preferas promeson ol nerespondon aŭ kontraŭstaron, ĉar almenaŭ promeso permesas insiston kaj la insisto povos oportune trabori granitan monton.

Responde al propono mia pri malfermo de Kurso de Esperanto, kaj dissendo de serio de paroladoj pri la sama temo ĉe la mikrofono de nia Nacia Radiostacio, mi ricevis la jenan leteron :

Nacia Stacio de Radiodissendo

Ref.—S.G.

Of. N-ro. 1912.

PC|HC

*Komisiis al mi Lia Moŝto la Prezidanto de la Direkcio sciigi al vi la ricevon de via letero de la 21a de Aŭgusto lasta, kaj samtempe informi vin ke, kvankam oni ne opinias oportuna ankoraŭ la efektivigon de via propono, la afero tuj estas konvene ekzamenota.*

*Je bono de la Nacio, Lisboa, la 31a de Oktobro 1944,*

*Administraj Servoj*

*La Ĉefo*

*(subskribita) Carmo Carrilho*

La Prezidanto de la Nacia Stacio estas S-ro António Ferro, ankaŭ Sekretario de la Nacia Propagando kaj Popola Kulturo.

Mi konstatas ke la Esperanta atmosfero estas tre favora en Portugalujo, kaj sentas ke nia popolo nur atendas eventon, kiu permesu la disvolviĝon de ĝia entuziasmo. Ververe kurso de Esperanto oficiale permesita tute efikas, kaj nun la Portugaloj gapas antaŭ la monto, esperante ke la konata *Mons parturiens* tiun ĉi fojon nasku elefanton.

SALDANHA CARREIRA

## SVEDUJO

**Membronombro**—Kvankam la milito ne rekte atakis la svedan popolon, la Esperanto-movado multe suferis. Longdaŭra soldatservo de la viroj kaj interrompo de la eksterlandaj rilatoj kaŭzis tion. Dum la tempo 1940–1943 la Sveda Esperanto-Federacio perdis 1,000 membrojn. Sed en 1944 revenis la fido je la estonteco kaj la Federacio kreskis iom. La nuna membronombro estas 1,100 en 57 lokaj grupoj.

**Sindiko**—Ke la malkresko de la membronombro ne fariĝis eĉ pli katastrofa certe multe dependas de la laboro de S-ro Tib. Morariu, kiu en 1941 estis elektita vojaĝanta sindiko de S.E.F. Li ĉirkaŭvojaĝis la landon, faris prelegojn, vizitis la diversajn grupojn kaj izolajn Esperantistojn. En 1944, kiam la membrokrizo ŝajnis esti forigita, li ĉesis sian oficon, kaj nun estas elektita honora konsilanto de S.E.F.

**Eksterlandaj instruistoj**—Pro sia sindika laboro S-ro Morariu, kiu nun estas sveda civitano, havis eblecon gvidi

nur kelkajn mallongajn kursojn. Sed D-ro F. Szilagyi, el Budapeŝt, restis en Svedujo dum la tuta milito kaj sinsekve gvidis kursojn en multaj lokoj. Lia prelega laboro estas ankaŭ tre valora.

**Gazetara informservo**—En la jaro 1940 S-ro Oskar Svantesson en Göteborg estis elektita gvidanto de la Gazetara informservo, kiu liveras presperantajn novaĵojn al la sveda gazetararo. Li diligente laboris dum la postaj jaroj kaj tiel faris konsiderindan helpon por vivteni la klerigadon de la ĝenerala publiko pri Esperanto.

**Korespondaj kursoj**—La kurso “Esperanto per poŝto” (elementa kaj daŭriga) kolektis ĉiujare ĉirkaŭ 300 lernantojn. En la jaro 1942 la Sveda Esperanto-Instituto komencis novan korespondan kurson sub la nomo “Esperanta Studservo”. Temas pri tradukekzercoj de la sveda en Esperanton. Tiu kurso celas pliperfektiĝi la Esperantistojn, kaj estas multe uzata de la Esperantogrupoj kiel ŝatata programpunkto. De la unua jarkolekto de tiu kurso vendiĝis 350 ekz. De la dua kaj tria jarkolektoj 250 ekz.

**Diplomoj**—La federacio pretigis diplomojn por 10, 25 kaj 50-jara membreco.

**Gruplaboro**—Por faciligi la aranĝon de kunvenprogramoj por la lokaj grupoj la Federacio en 1944 komencis eldoni “Arĥivon de grupprogramoj”.

**Esperanto-Instituto**—Sveda Esperanto-Instituto, fondita de S.E.F. kune kun la instruista kaj laborista organizaĵoj, multe propagandis por instigi la Esperantistojn pliperfektiĝi kaj trapasi la Esperanto-ekzamenojn. Ĉiujare ekzameniĝis 50–100 personoj. La Instituto ankaŭ pretigis specialan insignon, argentan por personoj kiuj trapasis la superan, kaj bronzan por tiuj kiuj faris la elementan. La Svedoj esperas, ke post la milito ankaŭ alilandaj institutoj transprenos la ideon pretigi tiajn ekzameninsignojn, prefere samspecajn. Por fari la ekzamenadon pli unuforma, kaj samtempe pli impona, la Instituto ekde 1941 fiksas certan daton (unu printempe kaj unu aŭtune) por la ekzamenskribaĵoj. Por tiuj datoj la Instituto liveris al la ekzamenotoj presitajn traduktekstojn, kaj la skribaĵoj okazis samtempe tra la tuta lando sub kontrolo de lokaj ekzamenkomitatoj, kiuj nun ekzistas en 27 lokoj.

**Somera Universitato**—En la jaro 1943 la instituto aranĝis “Someran Universitaton” en la urboj Lund kaj Malmö.

Partoprenis 112 personoj el la tuta lando. Prelegistoj estis prof. Björn Collinder, d-roj Karl Söderberg, John Stenström, F. Szilagyi, red-oj Paul Nylén, Tib. Morariu bankoficisto J. Strönne kaj F-ino Ella Nilsson.

**Someraj kursoj**—En 1944 du somerkursoj kolektis entute 64 personojn. Dum la kursoj, kiuj estis kombinitaj kun libertempa somerumado, prelegis D-ro F. Szilagyi, red. Sven Backlund kaj red. Tib. Morariu.

**Konferenco**—En 1940 ni planis grandan konferencon por la nordaj landoj, sed la milito malebligis la efektiviĝon. Tamen en 1944 kolektiĝis “Konferenco pri la popoloj ĉirkaŭ la Balta maro” kun pli ol 100 partoprenantoj. Prelegis red. Sven Backlund, prof. Björn Collinder, rektoro Joel Vilkki (el Finnlando), S-ino Alide Kuld-Leijder (reprezentantino de la Baltaj landoj) kaj ing. Fred Turner (el Anglujo).

**Jarkunvenoj**—La jarkunvenoj de S.E.F. en la lastaj 5 jaroj estis tre sukcesoj kun ĝenerale pli ol 150 kunstantoj.

**Rifuĝantoj**—La Svedaj Esperantistoj provis diversmaniere helpi la eksterlandajn rifuĝintojn. Ofte tamen intervenis malfacilaĵoj, sed la Sveda ŝtato ja kutime bone zorgas por la rifuĝintoj. Al la restadejoj de la Danaj rifuĝintoj ni disponigis 100 ekz. de dan-esperanta lernolibro.

**Esperanto-gazeto**—Sveda Esperanto-gazeto dum la tuta milito aperis regule ĉiumonate kun meznombro 2,000 ekz.

**Esperanto-libroj**—Eldona Societo Esperanto prezentis en 1942 la libron “50 jarojn kun Paul Nylén”. La saman jaron antaŭ Kristnasko D-ro F. Szilagyi eldonis “Verda rapsodio”. La postajn kristnaskojn li eldonis “Duan rapsodion” kaj “Trian rapsodion”. Stellan Engholm en 1943 verkis du novelojn “Maljunulo migras—Venĝo”. Li ankaŭ tiam komencis eldoni la kvaronarjan gazeton “Malgranda Revuo”. Tiu gazeto, kun tre altvalora enhavo, daŭre aperas. Estas ankaŭ eldonita svedlingva broŝuro de prof. B. Collinder kaj D-ro John Stenström: “Esperanto—la heredanto de latino—la egalulo de la naciaj lingvoj”. En 1944 fine aperis “Humora novelaro de Hasse Z” (Konata sveda humoristo) en traduko de D-ro Szilagyi.

**Testamenta donaco**—En 1944 konata sveda Esperantisto, S-ro Carl Winberg, mortis kaj testamente donacis 10,000 kr por Esperantoinstruado en la popollernejoj de la urbo Uddevalla.

**Estraro de S.E.F.**—Prezidanto: red. Paul Nylén; vicprez: Ernfrid Malmgren; sekretario: ing. Sven Alexandersson; vicsekr: poŝtoficeisto Sigvard Hakansson; kasisto: revizoro Birger Gerdman; kaj la ĉefdelegito de I.E.L.: ing. Karl Wästfelt. Anstataŭantoj: oficisto Sune Ahlm kaj instruistino Elisabet Olsson.

E. MALMGREN

## SVISUJO

Dum la lastaj jaroj mankis raportoj pri nia landa movado, ne kaŭze de nelaborado sed nur pro poŝtaj malfacilaĵoj. La Svisa Esperantistaro devis fariĝi sendependa, pro manko de instigoj el aliaj landoj, manko de kontakto kun la internaciaj centroj, manko de informiloj ĝustatempe riceveblaj. Tamen centra komitato, kiu scias kion ĝi devus fari, gvidis la aferon, kiu hodiaŭ povas esti prezentata.

Post 1939 la organizita Esperantistaro kreskis je 80%. Mi ne volas diri ke aliĝis tiom da novuloj, ĉar ĉefe revenis malnovuloj. Parton de la novuloj ni ŝuldas al nia koresponda kurso. En daŭro de 18 monatoj vendiĝis 700 germanlingvaj kursoj. Bonega rezulto, se oni pripensas la germanlingvan enloĝantaron de eĉ ne tri milionoj. Ni ne sukcesis ke ĉiu aĉetinto eklernu, sed niaj klopodoj tiucele ne ĉesos.

Refondita "Gazet-servo" kaj klopodoj de unuopuloj rezultis ke en 1944 aperis pli ol 150 gazetartikoloj. Ni komparu tion kun la 10–12 artikoloj de antaŭaj jaroj! Plie, ni aperigis multajn pagitajn gazet-anoncojn. La estonto por nia afero en la gazetaro estas esperiga.

La dummilitan izolecon ni jene povis kontraŭstari: *Svisa Espero*, nia oficiala organo aperas nun okfoje jare, kompare kun kvar numeroj antaŭmilitaj. La enhavo ankaŭ kreskis al rekordo. Manke de Universalaj Kongresoj, niaj Jarkunvenoj de 1½ tagoj etendiĝis al Kongresoj de kvin tagoj. Dumtage okazis kursoj de Ĉseh-instruisto, vespere interesaj prelegoj de D-ro Edm. Privat, Prof. P. Bovet, kaj aliaj eminentuloj. En 1944 por la unua fojo estis komuna kongreso kun la Laboristaj Esperantistoj. Ĉefe pro la kresko de la izola membraro ni kreis "Regionajn Kunvenojn", kutime po 4 jare. Ankaŭ tie la partoprennombro daŭre kreskis. Dum kvin antaŭaj jaroj mankis ekzamenoj dum la jarkunvenoj. En 1943 prezentis sin 9 kandidatoj, kaj 8 en 1944.

Ankaŭ la radion ni povis reuzi, okaze de la memortago al nia majstro. Mallongaj dissendoj de Beromünster kaj de Sottens estis permesitaj, kaj por la proksima vintro la ŝancoj por radio-kursoj estas bonaj.

Kun la rifuĝintaj gesamideanoj loĝantaj en nia lando ni daŭre kunlaboris. Ni helpis al ili private, ebligis vizitojn al niaj kunvenoj, kaj disponigis multajn lernolibrojn senpage por kursoj. Pro simpatio al nia afero flanke de la kampestroj ni povis disdoni propagandilojn en ĉiuj kampoj.

Kontentiga estas, do, la raporto flanke de la centro de S.E.S., sed malpli flanke de la grupoj. Ili daŭre stagnas, apenaŭ sukcesas pligrandigi la anaron, ne okazas kursoj. Mankas la gvidantoj kiuj povas doni la necesan tempon. Nur kiam grupo staras antaŭ la malfondiĝo, tiam venas savanto. Estus multe pli kontentige pli bone prizorgi ĝin antaŭe.

Dum 1944 pruviĝis en Svisujo, ke la Esperanto-movado ne povas esti venkita eĉ de granda kaj riĉa konkurenco, kaj ni fieras ke la plej kriza tempo forpasis. Ni trapasis tempon kiam alilanduloj apenaŭ povas imagi al si. Basic English ĉiam kaj ĉie estis menciita. Svisa eldonejo aperigis klarigan kaj lerno-librojn, kaj faris multe da gazet-anoncoj. Plie, la vortoj de ĉefministro Churchill malbonefikis por nia afero. Ne vekigiĝis intereso por Basic kiel lingvo, sed ekestis "modo". Oni volis kunmarŝi kun simpatia nacio, kun la venkontoj. Sed kiel ĉiu modo pasas, ankaŭ tiu jam pasis.

Kontraŭ Basic English la batalo estis nur interna; ĝi eksplodis publike kontraŭ Occidental. Vekiĝis kelkaj propagandistoj, kiuj pro nekonataj kaŭzoj elektis Occidental kiel sian "oran bovidon". Hia celo ne estis rekte labori por Occidental, sed detruu la Esperantomovadon. Ĉiu anonco, ĉiu artikolo estis direktita kontraŭ ni, kun malveraj, kun mensogaj lingvo-komparoj. Fine ni perdis la paciencon kaj aperigis cirkuleron, eltiraĵon el Germana partia gazeto. Laŭ tiu artikolo, en Germanujo, eĉ post la malpermeso de la artefaritaj lingvoj, la Occidental-movado estis tolerita, kaj eĉ subvenciita, en Vieno, kun la celo plene mortigi la Esperantomovadon. Movado kiu estas uzata, kaj kiu lasas sin uzi de la naciistoj, ĉe ni estas perdita, kaj post tiu cirkulero la gazetoj estas kvazaŭ fermitaj por Occidental. La Idistoj, kun kiuj ni dum antaŭaj jaroj malpaciis, treege silentis. Oni asertis al ni, ke ili plene

transiris al Occidental. Diversaj floroj, do, kreskis dum 1944 en nia ĝardeno.

Ni esperas paroli per tio, ke kun bona volo kaj entuziasmo oni povas venki ĉiujn malhelpojn.

O. WALDER

## URUGVAJO

En nia lando la laboro estis pli bona ol dum la antaŭaj jaroj. Ni aperigis tri dukolonajn artikolojn en unu el la plej gravaj ĵurnaloj en Montevideo, *La Trubua Popular*; plie preskaŭ ĉiuj gazetoj en la lando publikigis anoncetojn pri kursoj.

Nun funkcias tri kursoj en Montevideo, kun entute ĉirkaŭ 70 lernantoj. Ankaŭ estas kurso en Rivera. Samtempe funkcias regule kaj profite la kurso per poŝto. Dum Septembro ni okazigis tre interesan ekspozicion, kaj ni nun pretigas alian, pli imponan kaj en loko kredible oficiala.

Aperis la dua eldono de la hispana sloŝilo, multe plibonigita; la unua eldono elĉerpiĝis antaŭ kelkaj monatoj.

D-ro Emil Pfeffer aperigas monate tre interesan serion da folietoj sub la titolo *Idioma Internacional*, enhavanta artikolojn de la plej famaj pensuloj pri Esperanto.

P. CASAS

## USONO

Ekde la partopreno de Usono en la milito kondiĉoj por Esperanta agado estas multtrilate malfavoraj. La antaŭaj instruintoj de la lingvo ĝenerale havas postenojn, militajn aŭ civilajn, en la primilita klopodo, kaj deĵoras longajn horojn. Interurbaj distancoj estas grandaj, kaj la registaro malfavoras privatan vojaĝadon, escepte en okazoj de urĝa bezono. Pro tio la serio de ĉiujaraj kongresoj de Esperantistoj, kiuj okazis senescepte de 1908 ĝis 1942, spertis interrompon en 1943 kaj 1944. En 1945 oni tre esperas rekomenci la multe ĝuatan ĉiujaran kutimon.

Estas tamen agado en pluraj fakoj. Vendado de lerno-libroj daŭras iom vigla, precipe al grupoj en establoj de la armeo kaj de la mararmeo. Plej ofte vendataj estas la Usona eldono de *The Esperanto Home-Student* (James

Robbie) kaj *American Pocket Dictionary of Esperanto* (Vortareto de Karl Froding). De la *Home-Student* oni presis novajn eldonojn, entute 3,000 ekzemplerojn. De la *Pocket Dictionary* oni aperigis duan eldonon (1,500) en 1941 kaj trian eldonon (2,000) somere de 1944.

Du ekspozicioj de belaj Esperantaĵoj en urbaj bibliotekoj okazis en 1944 kaj vekis konsiderindan intereson. Unu, en St. Louis, aranĝis S-ro George J. Falgier. La duan, en Boston, F-ino Roan U. Orloff.

Komence de 1944 la dulingva gazeto *Amerika Esperantisto*, la oficiala organo de la Esperanta Asocio de Nord-Ameriko, estas eldonata en Nov-Jorko, en bele presita formato, sub ĉefredaktoreco de S-ro G. Alan Connor. Helpredaktoroj estas D-ro W. Solzbacher, Joseph Leahy, Doris Tappan Connor, kaj Pauline Knight. Fakredaktoro pri Ĉinujo estas Pastro John B. Kao.

En Detroit S-ro Robert L. Davis kaj lia edzino, S-ino Mabelle L. Davis, komencis eldonadon de nova gazeto, ĉefe anglalingva, nomata *Global Thinking* (Pensado Tutmonda), kiu pritraktas interhoman fratecon. Ĝi estas tute sendependa, ne estante ligita al iu organizaĵo, ĉu religia aŭ alia, sed estas ĉi tie menciinda ĉar ĝi uzas Esperanton sur pluraj paĝoj de ĉiu numero.

En Washington, sub mastrumado de S-ro Ernest G. Dodge, E.A.N.A. establis en 1941 pruntservon de Esperantaj libroj, liverotaj al mendantoj per la poŝto. La librokolekto grade kreskis per donacoj de pluraj interesatoj. Antaŭ la fino de 1944 la kolekto de prunteblaj legaĵoj jam enhavis 170 ĉefajn librojn, 90 malgrandajn librojn, kiujn oni prunteprenas en grupoj de tri, kaj 275 libretojn, kiujn oni ricevas en grupoj po kvin ĉiumende. Kontentiga nombro da registrintoj komencis uzon de la pruntkolekto, kaj kelkaj legas seninterrompe, libron tuj post libro.

La Esperantistoj Hispanlingvaj de Nov-Jorko okazigis, je la 19a de Novembro, grandiozan feston kaj balon, ĉe kiu ili disdonis libreton bele presitan sur glata dika papero. Ĝi enhavas, krom reklamoj, artikolojn en hispana lingvo pri la Esperanta movado en Hispanujo, en antaŭhitlera Germanujo, Jugoslavujo, Sovetio, Ĉinujo, Brazilo, kaj Argentino; ankaŭ pri rilato de Esperanto je la Ligo de Nacioj, je Panamerikanismo, je framasonismo, kaj ĝia uzo en muziko kaj film drama arto.

ERNEST G. DODGE

# ROBERT GRANT & SON

LIMITED



ESPERANTAJ LIBROJ

LIBROJ PRI SKOTLANDO

^  
GENERALA LITERATURO

EN DIVERSAJ LINGVOJ



126, PRINCES STREET  
EDINBURGH, SKOTLANDO

## NOTOJ PRI LA ADRESARO DE LA DELEGITOJ KAJ GRUPOJ

Tiu ĉi Adresaro estas ordigita ĝis la 31a de Marto 1945. Por ĉiuj postaj ŝanĝoj aŭ korektoj de la Delegita Adresaro oni vidu la "Oficialan Informilon de I.E.L." en *Esperanto Internacia*.

La personoj pretaj preni sur sin la taskon de Delegito, Vicdelegito aŭ Fakdelegito, kie I.E.L. ankoraŭ ne estas reprezentata, bonvolu skribi al la Landa Ĉefdelegito aŭ Peranto, aŭ al la Centra Oficejo.

---

### MALLONGIGOJ

ĈD = Ĉefdelegito  
D = Delegito  
VD = Vicdelegito  
FD = Fakdelegito  
EO = Esperanto-oficejo

La steletoj \* \* \* antaŭ teksto indikas pagitan reklamon de entrepreno.

---

